Benešov

La klubanoj kunvenadas dufoje monate en nombro de 4-6 homoj. Krom tio du klubaninoj ankaŭ dufoje partoprenadas kunvenojn de E kiubo en Prago, kie ili aniĝas. La klubanoj ĉeestas diversajn E aranĝojn, ekzeple BABILADOn en Prago, retajn kunvenojn de Esperantista klubo Brno, 2 aninoj partoprenis en SABLA PRINTEMPO kaj E SEMINARIO en PACOV, ambaŭ aranĝoj aprile 2026.

Unu klubanino partoprenis renkontiĝon de eksaj tendaranoj de SET en Lančov aŭguste 2026 kaj la klubanoj partoprenis amuzan programon de E MENTAL, LUDU kun NI, en Benešov fine de aŭgusto 2026.

La E klubo disponas per 2 montrofenestretoj, ĉe klubejo kaj en centro de la urbo, kie ĝi prezentas aktualaĵojn de ĉeĥa kaj internacia esperantujo.

Informas: Leonarda Chaloupková, 20.9.2026